



# LA VERDA TRISKELO



2 numéros par an - parution : printemps / automne  
VT 53 - oktobro 2024

Jen la aŭtuna VT ! Dankon pro la multaj artikoloj.

Bonan legadon al ĉiuj .

## Enhavo

Edito	p2
La Federacio	p2
Lokaj korespondantoj	p6
Rilate al heredaĵo	p7
Okazis kaj okazos	p11
Anoncoj	p14
Omaĝoj	p19
Pri lingvoj	p20
Traduko de libro	p21
Sumoo legado	p23
Vojago	p24
	p25

## COTISATION 2024

- y avez vous pensé ? -

Même si vous ne suivez pas de cours,  
même si vous n'êtes pas actif, soutenez  
l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant  
local si vous adhérez à un club, soit à  
Xavier Godivier (coordonnées p.4)  
pour adhérer à la fédération  
uniquement .

## AUX INTERNAUTES

Site internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion  
Bretonio et ainsi recevoir des nouvelles,  
plus fraîches et plus nombreuses,  
envoyez un message vide à l'adresse :  
bretonio-abono@esperanto-france.org

## EDITO

### Ni interŝanĝu plu!

Tiu jaro alvenas je la fino kun belaj memoraĵoj kiel vi povos legi en tiu verda triskelo. Memoraĵoj de renkontoj kun aliaj Esperantistoj, en Afriko por la unua UK en tiu kontinento, en Strasburgo por la sukseca Esperanto eŭropa kongreso, kaj pli proksime en Bretonio kun la omaĝo al Gaby samtempe kun nia membrokunveno. Okazis ankaŭ Vegetara Esperanto Renkontiĝo kaj aliaj malgrandaj eventoj.

Ekster tiuj kunvenoj, estas sento de manko de aktivado en niaj lokaj asocioj kie ne multas la membroj. Pro tio estis sugesto de **retaj kunvenoj** kiuj regule okazu inter Bretonoj por plifortigi la ligan inter la bretonaj Esperantistoj kaj prepari la venontaj renkontojn!

Kaj ĝuste grava kunveno okazos en 2025 en **Nanto** kie okazos la **kongreso de Esperanto en Francio de la 7a ĝis 9a de junio 2025**. Rezervu jam tiujn datojn!

Xavier Godivier

### Échangeons davantage !

Cette année se termine avec de beaux souvenirs comme vous pourrez le lire dans ce verda triskelo. Souvenirs de rencontres avec d'autres espérantophones, en Afrique pour le premier congrès mondial sur ce continent, à Strasbourg pour le succès du congrès européen d'espéranto, et plus près en Bretagne avec l'hommage à Gaby en même temps que notre AG. Il y a eu aussi une réunion végétarienne d'espéranto et d'autres petits événements.

En dehors de ces réunions, il existe un sentiment de manque d'activité dans nos associations locales où les adhérents sont peu nombreux. C'est pourquoi il a été suggéré que des **rencontres en ligne** devraient avoir lieu régulièrement entre Bretons pour renforcer le lien entre les espérantistes bretons et préparer les prochaines rencontres !

Et justement un rendez-vous très important aura lieu en 2025 à **Nantes** où aura lieu le **congrès d'espéranto en France du 7 au 9 juin 2025**. Réservez ces dates dès maintenant !

Xavier Godivier

## FEDERACIO

### Membro-kunveno de la federacio Esperanto-Bretonio

**dimanĉo la 17a marto 2024, 10a-12a en Saint-Quay-Perros**

24 ĉeestantoj 1 vizitanto, Trigo Peng, 1 prokuro. Kelkaj pliaj personoj alvenis dum la kunveno por ĉeesti la programon omaĝo al Gaby posttagmeze.

La **agadraporto kaj la financa raportode estas en la retejo de la FEB**, bretonio.esperanto-france.org

La agadraporto estas aprobita, post kelkaj precizigoj pri la aktivaj kluboj (substrekitaj en la raporto). La financa raporto estas aprobita.

**Renovigo de la komitato:** La laboro de la komitato estas plej ofte per Interreto kun diskutoj pere de reta diskutlisto kaj kelkaj retaj kunvenoj. La nunaj komitatanoj estas : Marielle Giraud Amapola Triguéro Jannick Huet Denis-Serge Clopeau Claude Bensimon Laurent Peuch Manjo Clopeau Xavier Godivier

Pliaj kandidatoj : Françoise Noireau Josette Ducloyer, Ĉiuj estis aprobitaj.

Laurent estis la reprezentanto de la FEB en la komitato de Esperanto-France sed ne plu pretas esti, ni do bezonos trovi novan. (*Aldono poste: Claude Bensimon estos nia nova reprezentanto*)

### **Sistemo de komuna kotiz-sistemo kun Esperanto-France**

Jam partoprenas al la sistemo Armor-Esperanto kaj Esperanto-Rennes. Pluezek intencas baldaŭ partopreni. Pluraj avantaĝoj de la sistemo estis prezentita : pli facila administrado de la membroj traktitaj ene de la komuna datumbazo de Esperanto-France, konsultebla interrete per la respondeculoj de la partneraj lokaj asocioj kaj federacioj. Esperanto-France kolektas la monon por la tri niveloj (nacia, regiona kaj loka) kaj donas fiskan atestilon por impoŝtpagantoj. Esperanto-France povas ankaŭ proponi senpagajn servojn kiel gastigado de ttt-ejoj, kiel tiuj de nia federacio kaj de Armor-Esperanto. Tio faciligas la laboron kaj ebligas ŝpari monon.

### **Projektoj**

Omaĝo al Gaby dum la posttagmezo post nia membrokunveno.

13-14 de julio, festivalo en Broceliande organizita de TEVA (Esperanto/Vegetaranoj) la federacio helpas per atestilo de asekuro por grupo de ĉirkaŭ 30 ĉeestantoj.


5-6 oktobro, evento en Saint-Aignan

### **Sugesto de estonta reta agado :**

Zoom kunveno unufoje monate : konversacia rondo pri diversaj temoj, ekzemple inter la 18-19 ĉiuj unuaj mardoj de la monato. La invito partopreni estos en la listo Bretonio kaj la evento povos esti registrita en "eventa servo" por allogi aliajn Esperantistojn. Vidu : <http://eventaservo.org>

Monhelpo por vojaĝantoj al Kongresoj. La federacio havas iom da mono kaj povas uzi ĝin por helpi bretonajn Esperantistojn partopreni al Esperantaj eventoj, pri vojaĝkostoj aŭ kotizo. Ne hezitu peti kaj diskonigi tiun eblecon. (UK en Afriko, Eŭropa kongreso en Strasburgo, staĝoj en Greziljono ktp).

## **Historio de la FEB 1994-1995**



Esperanto en Bretonio estas delongtempa afero. Eĉ jam en 1908 la esperanto asocio de Rennes ("rena klubo") ekskursis al Montfort-sur-Meu kaj loka ĵurnalo bele rilatis pri tio...

En 1994, dum Josette Ducloyer estis prekaŭ komencantino kaj loĝis en Kempero (Quimper), ŝi kreis tie Esperanto-gupon, kun 22 lernantoj jam la unuan jaron. Post konversacio dum staĝo en Bouresse kun Georges Lagrange, prezidanto de la centr-okcidenta federacio, kaj André Texier, membro de la rena klubo, venis al ŝi la ideo kunigi la esperantistojn en Bretonio. Ŝi kontaktis André kaj Geneviève Dinard, kiuj estris la Renan klubon kaj ili entuziasmiĝis. Jam la 30-an de septembro 1994 kuniĝis 6 samideanoj de Rennes kaj Quimper, kiuj decidis organizi amikecan renkontiĝon en Mûr-de-Bretagne la 5-an de marto 1995. Ili havis nek komputilon nek interreton... Tamen André Dinard kaj Josette Ducloyer, kun helpo de la familio Clopeau, sukcesis

kontakti ĉiujn bretonajn esperantistojn kaj la 5-an de marto 1995 kunvenis la tutan tagon 74 esperantistoj :12 el Côtes d'Armor, 13 el Finistère, 21 el Ille-et-Vilaine, 22 el Morbihan, 3 el Loire-Atlantique kaj 3 el Maine-et-Loire. Ili gaje tagmanĝis en la restoracio de la "base de plein air", laŭlonge de la lago de Guerlédan, multe laboris kaj ankaŭ aŭskultis prelegon de Bruno kaj Maryvonne Robineau. Estis starigitaj diversaj grupoj, kiuj cerbumis pri la estonteco. Jen kelkaj eltiraĵoj de la protokolo:

### **Points soulevés par les différents groupes sur l'organisation générale :**

*-Avoir un "réseau d'amitié" entre les groupes de Bretagne et ceux des autres régions*

*. Crainte quasi- générale de la lourdeur d'une "structure officielle", " administrative", à l'échelle de la région (trop accaparante, coûteuse en énergie et en argent, trop rigide, nécessitant un permanent, éloignement géographique des membres).*

*. Création de commissions d'étude, non dans le cadre d'une structure, mais pour rendre plus efficace une prochaine réunion générale.*

*. Prévoir une réunion pour mettre sur pied une organisation souple avec liaison, échanges, et préparer une réunion pour l'année suivante.*

*. Dans cette réunion régulière annuelle on pourrait répondre aux préoccupations des groupes et des isolés, grâce à un ordre du jour élaboré en commun qui éviterait de perdre son temps.*

*. Tout le travail préparatoire en dehors des réunions pourrait être coordonné par l'intermédiaire de un ou deux "responsables" par département (responsables de cours, animateurs de groupes...sans oublier les isolés) qui se tiendraient en liaison avec ceux des autres départements.*

*. Un moyen de liaison serait nécessaire entre les départements (les groupes et les isolés) par lettre, téléphone, peut-être un bulletin qui publierait les propositions, avis, suggestions, dans des rubriques à déterminer (peut-être identiques aux commissions)*

*. Les rencontres régulières pourraient-elles avoir lieu par la suite dans des lieux différents ?*

*. L'organisation pourrait-elle être confiée chaque année à un groupe différent ?*

*. La réunion prochaine devrait-elle prévoir une partie festive : culturelle, théâtre, chanson, projections, promenade... ?*

*. Cette réunion doit-elle se dérouler sur une fin de semaine (du samedi midi au dimanche soir) avec coucher sur place ( base départementale ou V.V.F. de Guerlédan) ?*

*La réunion devrait limiter ses discussions aux problèmes pratiques régionaux (éviter les thèmes généraux et de principe sur la langue - réservés aux congrès).*

**- Points particuliers sur les objectifs et les outils de travail, à examiner pour la prochaine réunion.** (d'après les propositions en commissions ou dans la dernière partie de la rencontre, et qui n'ont pu être discutés. Regroupés autant que possible en grandes rubriques) :

1 - Comment s'organiser régionalement. Bulletin de liaison des espérantistes de Bretagne. Moyens d'impression, de distribution.

2 - Rapports avec correspondants espérantistes, entr'aide, voyages, rencontres internationales. Tro Breiz, espéranto-jumelages.

3 - Relations avec les autorités régionale et départementales (propagande dans leurs bulletins, subventions)

4 - Rapports à développer avec Fédération Centre Ouest. Sous quelle forme ?

5 - Développement de l'enseignement- méthodes- matériel- organisation des cours, des stages régionaux, fonds de documentation - enseignement dans les écoles. Importance des examens à passer pour obtention des diplômes.

6 - loisirs (fêtes, pique-niques...) théâtre, chants, projections... organisés pour les espérantistes et autres publics.

7 - Propagande : participation aux foires-expositions, fêtes locales... ( fêtes de Cornouailles à Quimper, Lorient, Brest... )

8- L'espéranto dans les bibliothèques (municipales, universitaires) en particulier du livre de Claude Piron.

*Expositions. Le nom de Zamenhof ou de l'Espéranto à donner à une place ou une rue. Insignes à porter et à montrer. Presse locale, radios locales (même "très" locales) Offices de tourisme et lieux touristiques.*



Dum tiu kunveno de la 5a de marto 1995, estis starigitaj komisionoj kun reprezentantoj en ĉiu departemento:

*Commission constitutive de la Fédération Bretonne (informelle)*

- André TEXIER - Club esperanto Rennais - 9, square de Provence - 35000 -Rennes
- André BOURDET La Seve - Ecole publique de Conleau- 14, rue René Rueckel - 56000 - Vannes
- Jean Roger CHASLE 22, rue Ernest Rouxel - 22650 Ploubalay
- CLOPEAU D.S - 6, rue J.P. Calloc'h - 22000 - St Brieuc
- Joseite DUCLOYER - 1, allée de Kernisy - 29000 - Quimper
- André DINARD - 16, boulevard Sébastopol - 35000 -Rennes

*Commission pédagogique*

- Manjo CLOPEAU - 6, rue J.P. Calloc'h - 22000 St Brieuc - tel : 96 94 08 54
- Gaby TREANTON - 22700 St Quay Perros - tel : 96 23 02 63
- Jean-Roger CHASLE - 22, rue E. Rouxel - 22650 Ploubalay - tel : 96 27 28 88
- Geneviève DINARD - 16, Bd Sébastopol - 35000 - Rennes

*Commission propagande*

- Gaby TREANTON - 22700 - St Quay Perros - tel : 9 6 23 02 63
- André DINARD - 16, boulevard Sébastopol - 35000 - Rennes tel : 99 31 32 66

*Commission relations publiques*

- CLOPEAU D.S. - 6, rue J.P. Calloc'h - 22000- St Brieuc

*Commission activités*

- Gaby TREANTON - - 22700 - St Quay Perros

*ADRESSES DES GROUPES*

- ESPERANTO 22 - 8, rue E. Quinet- 22000 St Brieuc
- ESPERANTO Hennebont - M. Le Magadure Fred. - 23, rue Jules Ferry - 56700 Hennebont.
- Xavier ALLAINGUILLAUME - 52, rue Ratier - 56100 Lorient
- Gaby TREANTON - 22700 St Quay Perros
- La SEVE - groupe de Vannes - André BOURDET - Ecole Publique de Conleau- 14, rue René Rueckel - 56000 Vannes - tel : 97 63 43 03 - 97 41 76 69 - Fax - 97 63 88 46
- CLUB ESPERANTO RENNAIS - 9, square de Provence - 35000 Rennes tel : 99 31 32 66 - 99 38 14 88
- GROUPE ESPERANTO de ST MALO - Mme Anne-Marie ARGNEY - 47, rue du Père Lebreton - 35400 St Malo
- ESPERANTO A.F.C.E. QUIMPER - Joseite DUCLOYER - 1, allée de Kernisy - 29000 - Quimper - tel : 98 55 48 16

Ni ekvidas ke nuntempe multaj celoj de la "origina" kunveno estas plenigitaj kaj ke ekde preskaŭ 30 jaroj, grupoj daŭre ekzistas, iuj malaperis sed aliaj novaj estis kreitaj, tia estas la vivo...

Dua parto de la historio de la FEB, kun "oficiala" kreado, aperos en venonta Verda Triskelo.

Kompilita de Josette Ducloyer

## Lokaj korespondantoj kaj kursoj.

22	Armor Esperanto	Murielle Caré	06 70 60 58 18	murielle.care(a)me.com
22	Saint-Brieuc	Laurent Peuch	06 89 86 12 97	ltpeuch(a)hotmail.com
22	Plouézec	Jeanne Pouhaer	09 62 30 40 05	jeanne.pouhaer(a)orange.fr
22	Locquémeau-Cavan	Anne Desormeaux	06 04 01 27 64	anne_desormeaux(a)yahoo.fr
22	Lannion	Maja Mériaux	06 04 49 84 48	meriaux.family(a)wanadoo.fr
22	Pleudaniel	Pierre Cardona	06 99 38 20 89	kortep(a)gmail.com
22	St Michel-en-Grève	Hélène Dubois	02 96 35 73 06	helene22dubois(a)gmail.com
22	Rostrenen	Françoise Noireau	06 09 12 03 74	desirdapprendre(a)gmail.com
22	Dinan	Philippe Stride	02 96 27 87 43	<u>philippe.stride(a)wanadoo.fr</u>
29	Douarnenez	Chantal Allen	06 74 15 78 09	chantalallen9(a)gmail.com
29	Morlaix	Claudine Guégen	06 86 88 44 69	Esperantosolidareco(a)gmail.com
35	Rennes	Xavier Godivier	06 51 45 84 83	xgodivier(a)esperanto.org
35	Montfort-sur-Meu	Josette Ducloyer	06 35 32 02 00	jpducloy(a)gmail.com
35	St Malo	Anne-Marie Argney	02 99 40 24 86	amargney(a)wanadoo.fr
56	Hennebont	Yvette Veslin	02 97 36 08 75	herve.veslin(a)orange.fr
56	Lorient	Jean dit Yannick Le Guennec	06 78 59 98 56	jean.le-guennec(a)wanadoo.fr
56	Hennebont+Lorient	Claude Bensimon	06 22 08 29 32	cloesb(a)yahoo.fr
56	Pontivy	Marielle Giraud	02 97 27 76 98	liber.terre(a)wanadoo.fr
56	Rhuys	Francis Desmares	02 97 26 89 96	francismsg56(a)gmail.com
44	Nantes	Bruno Robineau	02 40 98 78 76	brobineau(a)orange.fr
44	St Aignan-de-Grand Lieu	Solange Goan	06 81 18 30 12	somigoan(a)gmail.com
44	Couëron	Luc Gouverneur	06 30 03 00 98	coueron-esperanto(a)orange.fr
44	Herbignac	Jean-Yves Santerre	02 40 88 96 98	jys.mys(a)club-internet.fr
44	St Nazaire	Chantal Barret	02 40 01 97 27	patchdomo(a)yahoo.fr

NB- "(a)" est utilisé à la place de "@" dans les adresses courriels données dans le VT pour éviter que ces adresses soient spammées suite à la diffusion du VT sur Internet.

On a pu faire des erreurs de copie, veuillez contrôler vos coordonnées et si vous constatez des erreurs ou changez de coordonnées, veuillez en aviser Josette Ducloyer. Merci d'avance !

**Le VT sera diffusé par internet.** Cependant, pour ceux qui désirent recevoir la version papier, certains clubs pourront l'éditer. Si vous désirez le recevoir **par la Poste**, s'adresser à :

Manjo Clopeau 06.95.50.65.64 manjo.clopeau[a]gmail.com 23 allée Lapérouse 56730 Saint Gildas de Rhuys

### Malnovaj leteroj senditaj al Gaby Tréanton dum la jaroj 1946-49

Kun la klubo de Lannion, ni aktuale legas kaj ordigas leterojn, kiujn Gaby Tréanton ricevis de siaj esperantistaj korespondantoj. Mi elektis nur pecetojn. Pri kelkaj el tiuj korespondantoj Gaby parolas en sia libro. Maja

- Jeannine Perra. Francio. Ŝi instruis Esperanton al Gaby

19.10.46

*“ Mi tre ĝojas ke Esperanto nun interesas vin. Jes estas tre bela afero kaj mi ŝuldas al tiu lingvo kelkajn el miaj plej belaj tagoj. Kiam vi konas la atmosferon de la internaciaj kongresoj, kiam vi havas la okazon vojaĝi en fremdaj landoj, tiam vi ankoraŭ pli bone komprenas la utilecon kaj la belecon de Esperanto. Estas ĉiam por mi granda plezuro renkonti gejunulojn kiuj entuziasmiĝas pro belaj ideoj. Civila Servo kaj Esperanto estas por mi la plej belaj aferoj kiujn mi havis la ŝancon de trovi en mia vivo. ”*

10.11.46

*“ Kion vi diras al mi pri via klaso tute ne miras min. Ĉiuj geinstruistoj pensas, ke tiujare la infanoj multe malpli bone laboras ol lastjare. Ili ankaŭ estas multe pli nervozaj. Mi mem estis hieraŭ tute senkuraĝigita. Mi bedaŭris mian aĝon, kiu devigas min resti instruistino ĝis la fino de mia labora vivo. Tamen pripensante iom pri tio, mi trovis ke mi tute malpravas. Mi faras ĉion kion mi povas. Se, kaŭze de la milito, la infanoj estas duonfrenezaj ni povas nenion pri tio. Eltiri siajn harojn nenion helpus. Mi parolis pri tio al kuracisto kiu pensas, ke estas tute normala. Laŭ li, la infanoj ankoraŭ plurajn jarojn perdos komprenpovon kaj laborkapablecon. Estas necese, ke ni bone komprenas tion, ni geinstruistoj, kaj ke ni provu akiri sufiĉan filozofion por toleri tion. Ne prenu tro tragedie viajn pedagogiajn malsukcesojn. Ĉar vi estas juna vi konos pli bonajn momentojn. Mi timas, ke mi neniam rehavos infanojn kiel antaŭ la milito, ĉar post 15 jaroj mi estas pensanta : mi manĝis mian blankan panon unue. “*

02. 12. 1946

“ Kara Gaby,

*... Mi tre ŝatis la sincerecon kaj intelektan honeston kiun mi trovis en via letero. Pro tio eble, pensante pri via agado kun la partizanoj, vi estis kelkfoje malserenigita al la SC (Civila Servo). Mi kredas, ke vi bone agis, ĉar vi faris malbonon al neniu. Mi mem donis monon al la partizanoj kaj deziris arde ilian sukceson. Eble estas stulta, sed kiam alvenis la armeo Delattre mi, kiel la aliaj, ploris, kriis, sendis florojn al la soldatoj. Kaj poste, pripensante pri tio, mi hontis, ĉar vere la odoro de la pulvo frenezigis min, kiu jam longtempe meditis pri pacifismo. Kia danĝero tiu kolektiva frenezeco ! Tiel mi komprenis la sintenon de tiuj, kiuj foriris al la buĉado kaj komprenis, kia estas la korforteco de tiuj, kiuj batalas kontraŭ la ĝenerala fluo.*

*Vi skribis, ke la plej granda parto de la Germanoj estis militistoj. Eble jes, sed mi ne certas pri tio, ĉar mi dufoje iris en Germanujo en la jaroj 1937 kaj 1938. La Germanoj kiujn mi renkontis tute ne estis militemaj. Eĉ en 1938, ili vidis la militon multe pli proksima ol ni, kaj unu el ili ploris, adiaŭante nin, ĉar li antaŭpensis kia katastrofo baldaŭ okazos inter niaj du popoloj. La malfeliĉulo ! Mi havis novaĵojn pri li de kelkaj semajnoj. Lia edzino, kiu tre afable kaj ĝoje ricevis nin dum nia vojaĝo estis mortigita dum bombardado. Li tre malĝojas. Mi tamen devas konfesi, ke tiuj Germanoj estis eble iom malsamaj al la aliaj, ĉar ili estis Esperantistoj. Ili estis sufiĉe nombraj, kaj diris al ni ke preskaŭ ĉiuj la Germanoj kvardekjaraj aŭ pli aĝaj ne estis batalemaj. Nur la junuloj estis. Kial ? Ĉar*

*ili estis edukitaj laŭ la nazista metodo. Kaj kial nazismo estis tiel forta ? Ĉar la Germanoj estis tro malfeliĉaj post la Versajla Traktado. Kiam la milito venis, ili prenis la armojn, sed kiom da Francoj ne prenis ?*

*Restas la ribadoj, la enmalliberigadoj. Mi volus esperi, ke la Francoj ne estis farinta tion, sed, ĉu la « miliciens » ne estis Francoj ? Ĉu ili ne faris bedaŭrindajn aferojn ? Kiam milito komencas, ni povas atendi la plej malbelajn agojn. “*

*Jea*

- Bill Dicks. Brita zono. Germanujo

23.03.47

*“ Mi tre bedaŭras, ke vi estis katoliko en via knabineco, sed nun ne plu estas. Mi tute ne komprenas kial, ĉar mi estas feliĉa kun la katolika religio. Vi bone konas ke, sen Dio, paco neniam estos en la mondo ! En via lasta letero, vi parolis iom pri pacifismo. Mi vere kredas, ke vi pravis kiam vi helpis viajn samlandanojn, ĉar pacifismo estas bona por malhelpi militojn, sed kiam lando estas okupita de aĉuloj kiel la nazioj, estas devo de ĉiu persono, batali por justa kaj daŭra paco, kaj por restarigi bonan, justan registaron, ĉu ne ? “*

*Bill*

- Nasif Mahrus. Fayum. Egiptujo

31.03.47

*“ Mi jam legis multon pri la malvarmeco en Eŭropo tiu ĉi jaro, kvankam en mia lando ni ne sentis tion, eĉ ne pluvis. Sed la unua de tiu ĉi monato multe pluvis eĉ neĝis, tio ne ekzistis de post pli ol 50 jaroj. Sed nun komencis la varmeco, kvankam ni ĝis nun portis pezajn vestojn laŭ la franca proverbo : « En avril il ne faut pas quitter aucun fil, en mai faites ce que vous voulez ». Plaĉas al mi legi, ke vi ŝatas vojaĝi, se vi volas viziti Egiptujon vi estus mia gasto, ĉu ne ? ”*

14.05.47

*“ Sendube mi ŝatas mian landon Egiptujo, ĉar mi estas vera egiptano. Mi estas Kopto (kopto signifas malnova egiptano, Faraonido) sendube la historio de nia lando estas mistera pere de niaj piramidoj kaj monumentoj. La Nilo trapasas la tutan landon kaj akvumas la tutan teron dum la tuta jaro. Sen la Nilo, Egiptujo estus oazo. Multe oni povas paroli pri nia lando. Nuntempe estas la plej lacigaj tagoj en la agrikultura jaro : ni havas la rikolton de la greno, kaj ni devas doni parton al la ŝtato por disdoni ĝin en la grandaj urboj. Se ni ne kompletas tiun devon, la ŝtato punas nin. Tial mi veturas preskaŭ ĉiutage al mia bieno por zorgi la aferon. Mi opinias, ke tio daŭros ĝis la fino de junio. Poste mi devos ripozi. Kutime, mi pasigas mian libertempon en Aleksandrio apud marbordo en la freŝa aero kaj la amuza banmaro. Belegajn momentojn mi pasigos, precipe kun miaj gefiloj, kaj tio estos bona okazo por vidi ilin, kun aliaj geamikoj. Ni profitu de tiuj momentoj. Sufiĉas sufero kaj laco !*

*Jes kara amikino, mi multe legis pri la sufero kiu okazis en via lando dum la malbona milito, kaj la detruo farita en via lando. Sed finfine, ĉio pasas, kaj la malbonaĵojn baldaŭ oni forgesos, ĉu ne ?*

*Multe da viroj forpasis en via lando, kaj aliaj forlasis la landon. Ŝajnas ke nuntempe, ne estas sufiĉe da viroj, ĉu ne ? Kompatinda estas via lando kaj popolo. Ĝi meritas ĉion bonan ĉar ĝi jam donacis la liberecon al la tuta mondo. “*

*Mahrus*



- Roberto. Bruselo. Belgio

29.06.47

“ *Estas enuo por niaj venontaj korespondaĵoj ĉar mi devas soldatiĝi la 7an de Julio en Lieĝo. Sed tamen vi povos daŭrigi sendi leterojn je mia normala adreso. Miaj gepatroj transdonos ilin al mi. En Lieĝo mi estos en Unua Instruada Kampo dum, kredeble, 6 semajnoj, kaj poste mi ne scias... eble okupado en Germanio. La belgaj soldatoj estas vestataj kiel la anglaj ! Libereco !!!* “

Roberto

- Gösta. Svedio

21.06.48

“ *En via letero, vi demandis min, kion mi opinias pri sovjetaj kaj usonaj eksperimentoj superregi la mondon. Amerikaj kapitalistoj ne plaĉas al mi. Sed ankaŭ ne la sovjeta diktatoreco. Socialismo en Sovjetunio estas falsego, kion multe da homoj nun devas kompreni per perdo de sia libereco. Mi ne kredas, ke registaro povas feliĉigi la homojn.* “

Gösta

- Willy. Hamburg. Germanio

12.03.1949

“ *Jes, kara amikino, nia maltrafo en Hamburgo estis tragika, kaj ankoraŭ hodiaŭ mi koleras kontraŭ mi, ĉar mi ne trovis la energion venki la malfacilaĵojn por rapidi al vi. Mi estas fiera pri via sincera klarigo de la eksteraj kaj eĉ de la internaj malhelpaĵoj, kiuj baris por vi la vojon al mi. Kaj nun mi konfesu : ankaŭ mi iomete timis nian renkontiĝon. La kaŭzo de tiu timo ne estas klara al mi, sed iu interna voĉo malkvietigis min per la stulta admono, ke povus ekesti animaj konfuziĝoj per nia persona renkontiĝo. Nun, mi petas, mia amata amikino, lavu al mi la kapon en via venonta letero kaj donu al mi tiajn moknomojn, kiajn mi meritas. Do, sincereco kontraŭ sincereco. Tamen, la bedaŭro pri la malsukcesa renkontiĝo estas hodiaŭ ankoraŭ pli granda ol antaŭe ; kaj mi deziregas, ke ankoraŭfoje venos por mi la okazo vidi vin, paroli kun vi kaj ĝui vian amikan estecon. Ankaŭ mia edzino estis tre malgaja, kiam vi ne plu povis veni al ni ; ĉar ŝi el mia diroj bone konas vin, tre ŝatas vin kaj volonte konatiĝus kun vi.* “

Willy

- Simon Stierman. Rotterdam. Nederlando

05.12.1949

“ *Kara Gaby,*

*Forte kaj tutkore mi esperas, ke post la legado de ĉi tiu mia letero, via brusto tiom ŝvelas ke la butonoj de viaj vestaĵoj flugas tra via ĉambro. Tio ja estas por mi la vera kaj klara pruvo, ke vi komprenas la grandegan honoron, kiun MI, SIMON, fiera posedanto de B-diplomo (do oficiale rajtigita rilate la instruon de Esperanto) kaj la feliĉa posedanto de leĝa edzino ankaŭ havanta B-diplomon, faras al vi per la elsendo de ĉi tiu letero. Vi do legu plenumile : jes, kara fratino nia, finfine vivosigno de ni ambaŭ. Vivosigno de du plenfeliĉaj homoj, kiuj sen malbonaj postsignoj en siaj animoj, spiritoj kaj korpoj postvivis la teruran B-ekzamenon ! Nun ni kapablas ĝojkrii, sed dum la lasta kursvespero – do la tago antaŭ la ekzameno – niaj korpoj ŝajnis pli malplenegaj ol iam antaŭe... »*

*Viaj nederlandaj gefratoj Leena kaj Simon, kies dompordo tuj malfermiĝos post via unua -eĉ la plej malforta- frapeto. Korajn salutojn, nia franca fratinetino, kaj pensu de tempo al tempo al viaj”*

Leena kaj Simon

## La du Verdaj Aferoj : Vegetarismo kaj Esperanto.

Kelkaj citaĵoj de la unuaj esperantistoj-vegetaranoj:

1909 / Jakob Leendert Bruijn, nederlanda aktivulo, vegetarano, esperantisto, anarkisto, kontraŭmililisto

*“Se vi volas malaperigi la nunan kapitalisman socion, ... ni devas ankaŭ malaperigi la viandkonsumadon.... Tiam la civilizacio progresos. Vegetarismo estas fortika helpilo al tia estonteco.”*

1914/ Oskar Büneman, germana, pacisto, socialisto, liberpenso, esperantisto kaj vegetarano

*“Vegetarismo estas Kulturo ...*

*Vegetarismo ne estas iu teoria penssistemo sen efiko sur la vivadon de la individuo; ĝi ne estas abstrakta ideo, kiun oni povas konfesi, ne praktikante ĝin. Vegetarismo estas principo, kiu devas esti aplikata al la ĉiutaga vivo, kaj kiu rilatas ne nur la stomakon, sed la tutan homon korpe kaj spirite.”*

1915 / Rudolfo Rojci, hungara fervojoficisto, vegetarano, esperantisto kaj socialista aktivulo

*“La vegetaranoj ... estas pioniroj de pli bona venonto.  
Ili estas la profetoj de venonta ora epoko”.*

1913 / J. Arthur Gill, brita, kvakero, vegetarano, esperantisto, unu de la 19 fondintoj de la IUEV (Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj) en 1908

*“La mondo Esperantista estas plenega de la spirito de amikeco. La fratiĝado de la mondo, la frateco de la homaro estas en nia buŝo ...*

*La interna ideo de Esperanto, nome Esperantismo, estas definitive ... disbati la barojn, kiuj dividas la popolojn, komencante ĉe la plej granda nuna barilo : la lingva barilo.*

*Vegetarismo kaj Esperantismo estas du Kultoj de la Vivo...*

*Pro tio ili ambaŭ estas verdaj aferoj; pro tio (ili) instinkte simpatias unuj al aliaj; pro tio ĉiam la propagando pace militadas sur iliaj kampoj reciproke; kaj fine pro tio ekzistas la Vegetara Ligo Esperantista.”*

Marielle Giraud

## Renkontiĝo en Pluezek

Le samedi 6 et le dimanche 7 avril, une trentaine d'espérantistes se sont retrouvés à Plouézec. Armor Espéranto en a profité pour faire son AG pendant que les autres participants ont fait des jeux en espéranto. Puis il ya eu des groupes de travail avec Jean-Yves pour les komencintoj, Jérôme pour les progresantoj. Ewa nous a présenté l'Oulipo et nous a fait écrire. Laëtitia, la fille de Fransoazo nous a parlé des peuples premiers du Canada (pays dans lequel elle vit) et Christiane nous a présenté la Tanzanie. Pour finir le week-end, certains ont visité le Moulin de Craca pendant que d'autres ont suivi une conférence de Fransoazo sur la grammaire.



## Vegetara Esperanto Renkontiĝo.

La 13-14 an de julio 2024 okazis vegetara esperanto renkontiĝo en la ekologia loko "Terre et Partage" (Tero kaj Kunhavigo), situanta 262, La Guette en Beauvais FR-35380 Paimpont. Oni povis kampadi surloke.

La programo de la evento, majstre organizita de Nikol Rizzoni en agrabla loko ĉe la rando de la fama arbaro Broceljando, estis ege varia kaj interesa :

- laborgrupetoj pri esperanto por komencantoj kun Josette Ducloyer kaj por progresantoj kun Françoise Noireau



- piedira malkovro de la arbaro Broceljando



- interŝanĝo pri vegetarismo kaj pri TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio), kun prelego de Marielle



- ekkono de sovaĝaj manĝeblaj plantoj, teorie



Aranĝo : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - [helene22dubois@gmail.com](mailto:helene22dubois@gmail.com) - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :

Prolegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 [chantalallen9@gmail.com](mailto:chantalallen9@gmail.com) korektado Josette Ducloyer [jpducloy@gmail.com](mailto:jpducloy@gmail.com)

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

Kaj praktike, kun Marie-Gabrielle Degas, herboristino, kaj Romain Huet, botanisto, ege kompetentaj profesiuloj



- ekkono de fabeloj pri Broceljando per la libretoj de J.P. Ducloyer kaj de Pascal Lamour



- komuna preparado de vegetaranaj manĝaĵoj... kaj poste la tagmanĝo !



Partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj el la tuta Francio, el kiuj 8 komencantoj, kiuj espereble fariĝos valoraj esperantistoj!

Aranĝo : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - [helene22dubois@gmail.com](mailto:helene22dubois@gmail.com) - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :

Prolegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 [chantalallen9@gmail.com](mailto:chantalallen9@gmail.com) korektado Josette Ducloyer [jpducloy@gmail.com](mailto:jpducloy@gmail.com)

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

## Vegetara Esperanto Renkontiĝo en La Guette

Nikol organizis tiun renkontiĝon la 13an kaj 14an de Julio 2024.

Hubert kaj mi povis veni nur dimanĉon. Kio interesis nin en la riĉa programo estis « Malkovro de sovaĝaj manĝeblaj plantoj ».

Sed antaŭ la promenado, ni renkontis Josette kaj Francoazo, kiuj entuziasme instruis Esperanton al sufiĉe grandaj aroj da lernantoj.

La botanika malkovro, gvidita de Romain kaj Marie-Gabrielle, estis ege interesa. La du junuloj priskribis preskaŭ 20 diversajn plantojn, kiuj ĉiuj kreskis ĉirkaŭ la dometoj de la bieno : urtiko, trifolio, simfido, rubuso, plantago, okzalo (rumekso), meliso, ktp.

Se vi petas de Nikol, vi povos elŝuti dosierojn en Esperanto pri tiuj plantoj.

Mi devas diri, ke en La Guette, la ĝardeno estas pripensita por altigi la biodiversecon : ne tro da purigo, lasi la naturon disvatiĝi kiel ĝi deziras. Se vi legis la Verdan Triskelon n° 50 (marto 2023), vi eble memoras, ke la grupo de Lannion tradukis tekston : « Kiel plibonigi biodiversecon en via ĝardeno ». Subtitolo : pura ĝardeno ne taŭgas por la vivo.

La Guette estas perfekta ekzemplo de tia ĝardeno, kaj oni trovas en ĝi ĉion por sin kuraci.

Post bongusta vegetara manĝo, ni piediris tra la arbaro Broceljando, gviditaj de Alexis, la posedanto de La Guette : ni trairis tra la « senreira valo », ĝis la « kresto de la drako », kaj la « rifuĝejo de feino Viviane ».

Dankon al Nikol por tiu belega tago.

Maja kaj Hubert



## ... Kaj Okazos.

### GREZILJONO anoncas :

Korusa staĝo okazos en la kastelo Greziljono de la 21-a (lunde) je la 18-a horo (aŭ marde je la 10-a horo) ĝis la 27-a de oktobro 14-a horo. La koncerto en la kultura centro de Beaugé kun 3 aliaj korusoj de Angers okazos sabate 26an de oktobro..

Paralele, okazos la evento AŬTUNAS ĝis la 30-a de oktobro je la 12-a horo. Bonvolu aliĝi plej rapide [alighilo](#)

Jen la detaloj:

## AŬTUNAS - Interkant 13-a komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj . Kursoj kaj variaj aktivaĵoj, programo por infanoj.

alveno lundon, 21an de oktobro 2024 ĉ. Je la 18a  
foriro merkredon, 30an de oktobro tagmeze

- KURSOJ
  - [Frank Lappe](#) : Ni komencu kune ! (A1-A2)
  - [Alain Delmotte](#) : Progresadi per ludo en ĝojo (B1-B2)
  - [Renée Triolle](#) : E-kurso per diskutoj (C1-C2)
  - [Ekzamensio](#) de Franca Esperanto-Instituto 2024-10-30
- AKTIVAĴOJ por infanoj
  - [Larysa Osadčuk](#) : Origamio, japana arto
  - Irlanda folkloro festo antaŭ-Halovena *Kunportu vian maskokostumon ! 2024-10-29*
  - Bert Schumann : Sportaj aktivecoj : Naĝejo en Beaufort, *Boule de fort* en Baugé, Kajaki sur la rivero Loir, arbogrimpi en Brion, tablotenis, flugpilko, piedpilko kaj *petanko* en Grésillon *ptm*
  - Skoltumado : Per bnditaj okuloj sekvi vojon per ŝnuro
- AKTIVAĴOJ por adultoj
  - [Bernard Bigonet](#) : Ĥora (korusa) kantado *en Esperanto kun Interkant okt-21/27* » » kantateliero *okt-27/30*
  - Frank Lappe : Praktika kurso de Unua Helpe (sukurado)
  - Alain Delmotte : Sorobano, japana abako, magia kalkulilo en via kapo
  - Bert Schumann : Volontula laboro por tranĉi arbustojn ĉirkaŭ la lageto *okt-(17)/21/28/(nov-03)*
  - Xavier Godivier : Meditadoseancoj pri plenkonscia meditado
  - Promenado en le parko por malkovri la lokan flaŭron kaj faŭnon
  - Libroservo surloke, vidi la [liston](#)
- VESPEROJ
  - Koncerto plurhora en Baugé 10-26, *salle Altréa*
  - Peter Wraae : Prelego pri la dana filozofa Martinus
  - Renée Triolle : Fotoprelegoj pri Lidia Zamenhof, Alain Rémy ...
  - Alain Delmotte : *Reprezentado de plantoj* (desegnoj, pentraĵoj), *Plantoj kaj homoj* (nutraĵo kaj ĉefe medicinaj plantoj : kiel tio funkcias), *Mirindaj plantoj*
  - Svitlana Kozarenko : Ukrainujo, mia hejmlando ?
  - Ludoj por ĉiuj : societaj tabloludoj, skrablo ...

### KURSO C1-C2

- Renée Triolle estas emerita instruistino pri la rusa lingvo. Ŝi lernis Esperanton 16-jara. En sia esperantista vivo ŝi aktivis en la junulara movado, poste en la franca, Eŭropa kaj monda Esperanto-asocioj. Per kaj por Esperanto, ŝi oftege vojaĝas en multaj landoj.
- Nun ŝi oficas kiel direktoro de la ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto. Dum la staĝo eblas trapasi FEI-ekzamenon.
- En la kurso, surbaze de diversaj legataj tekstoj, ni diskutos pri la koncerna temo (varie ekologio, socio, literaturo, historio ktp). Laŭ la peto de bezono de lernantoj, eblas trakti gramatikan punkton.

### KURSO B1-B2 « Progresadi per ludo en ĝojo »

- Dank'al tre diversaj ludoj, ni kreos ĝojan kaj fruktodonan etoson. Ni ne nur ludos, sed ankaŭ ni havos rigardon al la gramatiko kaj pliriĉigos nian vortprovizon. Ni tamen ne forgesos rigardi la historion de la lingvo kaj de la movado por lerni kaj poste efike labori por la lingvo. Se vi jam uzas skribe la bazajn regulojn kaj deziras progresi, tiu grupo estas por vi !
- NB : Masko portenda en la klascambro, laŭ la sana situacio !
- **Alain** komencis la esperantan grupon en Loveno-la-Nova en Belgio ĉirkaŭ 1997 kaj tie instruis kelkajn kursojn por komencantoj. En Montpeliero li instruis Esperanton por progresintoj kadre de la *Centro Esperanto de Montpellier*. Lastatempe li instruis dum la kongreso de ILEI en Italio, kurson de progresantoj.

## KURSO A1-A2 : « Ni komencu kune ! »

- Frank LAPPE estas esperantisto el Frankfurto ĉe Majno kaj partoprenanto de la unujara *Instruista Trejnado* en Poznano pri metodiko de lingvoinstruado. Komence li lernis Esperanton memstare en 2016, sed la unuan kurson li sekvis en Greziljono !
- Ĉi tiu kurso celas al tutkomencantoj aŭ al personoj, kiuj jam eklernis Esperanton, sed ankoraŭ konsideras sin komencantoj.
- La kurspartoprenantoj ne bezonas kunporti lernolibron, la kursmaterialo el diversaj fontoj haveblas dum la kurso. Ni ankaŭ ludos kaj spektos filmojn.
- La instrua lingvo estos Esperanto ekde la unua tago, ĉar verŝajne la kunkursanoj venos el diversaj landoj. Krom tio, tiel ni tre frue enprofundiĝu en la cellingvon. Ni volas trejni ĉefe nian parolkapablon, sed ankaŭ nian lego- kaj aŭdkomprenon.
- Ni prepariĝu ankaŭ al la kurso pri medicina Unua Helpo, kiu sekvos je la fino de la semajno. Ĝi okazos sendepende de la lingvokurso, sed estas malferma al ĉiuj interesiĝantoj.

## EKZAMENSESIO de Franca Esperanto-Instituto

- [Legu tie](#) kaj kontaktu nin.
- Ĝenerala programo la **30**an de oktobro :
  - 8h45 : enskribiĝo kaj pago
  - 9h-10h : unuagrada ekzamano / gramatika testo por la duagrada
  - 10h15-12h15 : skriba parto de la duagrada
  - posttagmeze : parola parto : po 20 minutoj. Unu preparas dum alia trapasas. Laŭ la programo de la sukcesintoj, organiziĝas la vico.

## Aktivaĵo : ĤORA (KORUSA) KANTADO

- La ĥoro Interkant daŭrigas siajn kantostaĝojn. Se vi volas kanti en Esperanto kun nia ĥoro kaj ĝoji varman etoson, ni bonvenigas vin por kuniĝi kun ni ekde dum tiu kanta studperiodo. Provi neniel devigas vin engaĝiĝi.
- Ekzercado matene kaj posttagmeze, ekde mardo, (alvenu lundon ĉ. 18h).
- Ĥorestro : **Bernard** Bigonnet el Sudfrancujo
- Kantoj en Esperanto laŭ la kutima repertuaro.



- Je via [aliĝo](#), marku la radio-butonon "Aliĝo al : Aktivajoj, kurso".

## Infanoj : ORIGAMIO

- Origamio estas malnova japana arto faldi paperon por krei belegajn malgrandajn figurojn. Ni lernos la bazojn de tiu arto kaj faros diversajn modelojn. Ni kreas ankaŭ manpupojn el papero kaj eble preparos pupteatrajn scenetojn. Taŭga por homoj inter 6 kaj 99 jaroj.
- Tiu kurso okazos en luda formo, kun origamiaj fabeloj, moviĝantaj modeloj, enigmoj, trukoj, fingra pupteatro ktp.

Per niaj faritaj modeloj ni eble kreas filmetojn laŭ la tekniko de origamio.

- **Larysa** studis molekulan genetikon en Kievo, poste pupteatron kaj origamion en Moskvo. De pli ol 20 jaroj ŝi okupiĝas pri origamio kaj pupteatro kaj pri edukaj ludoj por infanoj. En la ateliero ŝi laboras kun **Alain Delmotte**.

## PREZO kaj ALIĜO al restado en Greziljono

- La prezo de via restado kalkuliĝas aŭtomate dum via reta aliĝo. Por taksi la prezon, sufiĉas indiki la aĝkategorion, ĉambron kaj nombron de noktoj. [Klaku ĉi tien por aliĝi](#).
- Prezo ekde 8 € tage (infano, kurso kaj aktivajoj, tendejo, memzorganto).
- Ĉioinkluziva prezo por kompleta restado dum 8 tagoj : inter 319 kaj 540 € (tendejo 274 €).
- Redukto de 5% validas por aliĝo kun antaŭpago de 100 € almenaŭ 30 tagojn antaŭ komenco de kompleta restado.
- Ĉiuj niaj tarifoj [tie](#). Ekstrakto : ĉambro 9-38 €, kampadejo 5 € ; tri manĝoj 23 €, kurso kaj programo 12 €, tage.

Fotoj en 2023:



## Armor Esperanto anoncas : “ Bonvenon al la studperiodo ! »

Vi deziras plibonigi vian Esperanto-nivelon, vi ŝatas agrablan etoson kun aliaj samideanoj, vi ĝuas renkontiĝojn kun homoj de diversaj lokoj,

Ĉeesti prelegon pri la unua kongreso de UEA en Afriko plaĉus al vi.

Do, ne hezitu partopreni en la venonta studperiodo de Armor Esperanto la 16an kaj 17an de novembro en San Briego. (vidu la prezenton kaj la aliĝilon en la paĝo de tiu revuo).



### ESPERANTA STUPERIODO

St BRIEUC

sabaton la 16an kaj dimanĉon la 17an de novembro 2024

Domo de asocioj - 30 strato Brizeux ST-BRIEUC

#### Programo

<b>Sabaton:</b>	<b>10 h 00</b>	akcepto
	<b>10 h 30</b>	kursoj: 4 niveloj
	<b>12 h 00</b>	manĝaĵo (kunportu ĝin en via sako)
	<b>13 h 30</b>	kursoj
	<b>15 h 30</b>	paŭzo
	<b>17 h 00</b>	fino de la kursoj
	<b>17 h 30 – 18 h 30</b>	Prezentado de la unua Universala Kongreso en Afriko Elinjo kaj Petro Le Dru

**Dimanĉon: studperiodo de la 10a ĝis la 12a matene kaj poste de la 13a30 ĝis la 16a30**

#### Instruistoj

- 1- Komencantoj:** Jérôme Caré
- 2- Komencintoj:** Aleksandra Roberts kaj Noël Reysset
- 3- Progresantoj:** Elisabeth (Elinjo) Le Dru
- 4- Babilantoj:** diversaj proponoj, teatraĵo kun Laurent, legado, tradukado...

#### Prezoj:

- senpaga kurso por komencantoj kaj junuloj ĝis 25jaroj,
- por la aliaj: 10 € por 2 tagoj

**Eblas pagi surloke, prefereble per ĉeko por Armor Esperanto**

**Aliĝilo: sekva paĝo**

**Bonvolu sendi ĝin antaŭ la 31a de oktobro 2024 al :**

**Armor Espéranto**  
chez Jean-Yves Jégou  
7 rue de la fontaine  
22 400 Coëtmiex

aŭ **jegoujy@yahoo.fr**

Informoj : Jean-Yves Jégou 06 67 25 49 30

<b>Esperanta studperiodo - Stage d'espéranto</b> Je la 16a kaj la 17a de novembro 2024 en St-Brieuc Les 16 et 17 novembre 2024 à Saint-Brieuc Aliĝilo / Bulletin d'inscription	Elektita nivelo Niveau choisi (1, 2, 3 aŭ 4)
<b>NOMO/ NOM</b> <b>Antaŭnomo / prénom</b>  <b>Poŝtadreso / Adresse postale</b>  <b>Retadreso (per majuskloj) / Courriel (en majuscules)</b>  <b>Telefonnumero / Numéro de téléphone</b>  Sabaton, mi proponas mian domon por tranokti por ..... persono(j). / Samedi, je propose d'héberger .... personne(s).  Mi serĉas domon por tranokti sabaton. / Je cherche un hébergement pour samedi. <input type="checkbox"/> jes <input type="checkbox"/> ne	
<b>NOMO/ NOM</b> <b>Antaŭnomo / prénom</b>  <b>Poŝtadreso / Adresse postale</b>  <b>Retadreso (per majuskloj) / Courriel (en majuscules)</b>  <b>Telefonnumero / Numéro de téléphone</b>  Mi proponas mian domon por tranokti por ..... persono(j). Je propose d'héberger .... personne(s)  Mi serĉas domon por tranokti. / Je cherche un hébergement pour samedi. <input type="checkbox"/> jes <input type="checkbox"/> ne	

Sendu tiun aliĝon al

**Armor Espéranto**  
 chez Jean-Yves Jégou  
 7 rue de la fontaine  
 22 400 Coëtmieux

Aŭ al : [jegoujy@yahoo.fr](mailto:jegoujy@yahoo.fr)

Pli da informoj : Jean-Yves Jégou 06 67 25 49 30

## Anoncoj.

### INK

Jen reklamo pri nuntempaj projektoj de INK (Interkultura Novelaro konkurso) por legi, verki kaj aŭskulti:

ligilo: <https://bobelarto.ink/>

### ORA ULEKSO

La grupo de Saint-Malo donacis al mi kolektaĵon de la “Ora Ulekso”, kultura bulteno de okcidentfranciaj esperantistoj de la jaroj 1953 al 1960, redaktita de K. Martin, apartenanta al la grupo “Libero-Laboro” en Rennes.

La numeroj estas binditaj en unu libro.

En la bultenoj estas interesaj artikoloj pri famaj lokoj en nia regiono, geografiaj, historiaj, ekzemple pri Vannes, Dinano, Kempero, Huelgoat, Concarneau ktp... kaj ankaŭ pri pli ĝeneralaj kulturaj temoj. Desegnaĵoj ilustras la artikolojn.

Mi dezirus, ke vi profitu tiujn artikolojn sed ili bezonas esti denove tajpitaj kaj kelkfoje modernigitaj. Ĉu iu el vi pretus fari tion, por aperigi iun de tempo al tempo en niaj Verdaj Triskeloj? Mi ne estas sperta pri tajpado kaj preferas doni la taskon al aliulo/ino pli sperta ol mi.

Ne hezitu kontakti min por ke mi transdonu al vi la kolektaĵon ! Ne estas peza kolektaĵo, ĝi konsistas nur en unu libro kaj la artikoloj estas redaktitaj en facila lingvo.

Josette Ducloyer [jpducloy@gmail.com](mailto:jpducloy@gmail.com)

## Omaĝoj

### Omaĝo al Gaby Treanton , la 17an de marto 2024.

Tiu omaĝo estis organizata en la festosalono de Saint-Quay-Perros por kunigi ĉiujn amikojn de Gaby, kvin jarojn post ŝia morto. La tago komenciĝis per la jarkunveno de la FEB. Post komuna manĝo ekis akcepto de la vizitantoj.

Dum la posttagmezo enmiksiĝis esperantistoj, loĝantoj de Saint-Quay-Perros kaj amikoj de Gaby, kelkfoje venante de malproksime. Ekspozicio de leteroj en Esperanto, ricevitaĵoj de Gaby tuj post la dua mondmilito, kiam ŝi komencis lerni Esperanton, ĝis la jaroj 2000. La klubo de Lannion legis amason da leteroj el la tuta mondo, konservitaĵoj de Gaby. La klubo elektis la plej interesajn kaj tradukis ilin en la franca por prezenti al la ne-esperantistoj. Vi povas legi kelkajn el tiuj leteroj ĉi-sube.

Ĉirkaŭ la salono estis prezentataj objektojn, librojn, poŝt-kartojn, apartenintajn al Gaby, laŭ diversaj temoj :

- Gaby la vojaĝantino
- Gaby donacema
- Gaby la legantino
- Gaby la pacifistino
- Gaby la ligil-teksistino

Granda amaso da fotoj fotitaj de Gaby estis proponata memserve, laŭvole. Sur ekrano, lumbildaro resumis la vivon de Gaby.

Je la 15a okazis ege kortuŝa kaj varma momento : multaj partoprenantoj venis al la mikrofono por rakonti feliĉajn aŭ amuzajn memoraĵojn travivitajn kun Gaby.





Poste, la tuta ĉeestantaro piediris al la apuda tombejo. La organizantoj devualigis steleon de granito, skulptitan de loka artisto Vivien Gamba. Kantoj en Esperanto akompanis tiun emociplenan momenton.

Tiu tago longtempe restos en niaj koroj. La urbestro de Saint-Quay-Perros donis al ni rendevuon por la inaŭguro en 2025 de la strato, kiu nomiĝos « Gabrielle Treanton ».

## Pri lingvoj

### Programeroj por progresantoj en la renkontiĝo de Pluezeko en aprilo 2024.

Ĉu vi jam re-hejmeniris de Esperanta semajnfino sen memori kiujn prelegojn vi aŭskultis? Ne hontu! Mi prelegis en Pluezeko sed mi ne memoras pri kio mi parolis! Tamen, feliĉe restas dosiero en mia komputilo, kun la rilataj prezentaĵoj!

Eĉ tiuj el vi, kiuj ne spertis la ĝojon renkonti en Pluezeko mian ĉarman filinon kaj mian amuzan nepon el Kebekio, almenaŭ konservos, danke al tiu valora bulteno Verda Triskelo, spurojn el la traktitaj temoj.

Sen plano kaj ordo, jen la titoloj:

- La Fundamento (demandoj kaj respondoj pri la Fundamento)
- Fonologio kaj fonetiko (konceptoj aplikataj al Esperanto)
- Langorompiloj (laŭte elparoli malsimplajn frazojn)
- Oftaj eraroj (listo de lingvaj eraretoj)
- Interkona floro (grup-laboro por esprimi sin kaj ekkoni la aliajn)

**Pri la Fundamento**, estas neatenditaj faktoj kaj asertoj, ekzemple:

- Kial mi ne citos Esperantlingvajn frazojn el la Fundamento?
- Quels sont les trois piliers considérés comme la base de l'espéranto ?
- Quelle entité aurait le pouvoir de modifier le Fundamento ?
- Quelle recommandation principale l'auteur fait-il à chaque espérantiste ?

Mi esperas, ke tiuj, kiuj ĉeestis memoras pri la respondoj!

La 16 reguloj estas tie ĉi: [https://www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/gramatiko\\_franca.html](https://www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/gramatiko_franca.html)

**Fonologio kaj fonetiko** alie prilumas Esperanton.

- Ni miras, ke la voĉa *dz* ne havas propran literon, male al la senvoĉa *c*.

- Ĉu vi scias, kiuj literoj rolas kiel konsonantoj, sed estas vokaloj?
- Ni miregas, ke “duonvokalo” jam ne ekzistas de 30 jaroj, sed oni diru *alproksimantoj*.
- Provu elparoli afrikatojn (pf, ts, ks)... malfacilaj por francparolantoj!

Mi esperas, ke tiuj, kiuj suferis pro miaj ekzercoj de *son-kombineblo* (fonotaktiko) kaj *son-glito* (asimiliĝo), *duobla konsonanto* kaj *akcento*, *r* kaj *h*, nun parolas perfekte neŭtran Esperanton sen franca akĉento!

La bazaj elparolaj reguloj estas tie ĉi: [https://bertilow.com/pmeg/skribo\\_elparolo/elparolo/bazaj\\_reguloj.html#i-7fo](https://bertilow.com/pmeg/skribo_elparolo/elparolo/bazaj_reguloj.html#i-7fo)

**Langorompiloj** estas ofte sensencaj frazoj, kiujn ni devis laŭte kaj rapide ripeti. Ekzemple:

**UR/KR**

L'urso urĝe kuris  
de l'kruda urtiko  
kaj l'akra kritiko.

Oleg Ĉajka (Moskvo) kaj Fransoazo



Faka grupo pri elparolado, kun homoj el la plej diversaj lingvaj originoj, estas tie ĉi: <https://t.me/fonetiko>

**Oftaj eraroj** senkonscie infestas nian paroladon kaj verkadon. Kiel ratoj en kelo, ili rapide disvastiĝas en niaj societoj. Ne venos rato mem al la kato, diras la proverbo. En Pluezeko, ni senkompatate ĉasis *ateliero*, *migri*, *marŝi*, *dividi ekranon*, *konferenco*, *merkato*, *kalkuli*, *meznokte*, *video* kaj *korekte*! Ankaŭ superflujajn akuzativojn kaj iksojn anstataŭ supersignojn. Por ne stumbli sur ratoj, utiligu:

- <https://vortaro.net/>
- <https://reta-vortaro.de/revo/>
- <https://tekstaro.com/>

**Interkona floro** estas aktiviga kaj sencohava grup-laboro, paroliga procedo utila por lingvo-instruo en labor-grupeto. La celo estas, por ĉiu partoprenanto, trovi en la grupo personon, kun kiu li aŭ ŝi havas la plej grandan nombron da komunaj punktoj. La diskutoj tuŝas personajn, intimajn temojn. Tiel parolante, oni forgesas ĉion, kion oni lernis pri lingva ĝusteco! Ha, ha, ha!!!

Fransoazo (Françoise NOIREAU), [desirdapprendre@gmail.com](mailto:desirdapprendre@gmail.com) 06 09 12 03 74


### “Por pra-arbaro en okcidenta Eŭropo” Francis Hallé

*Jen la dua parto de artikolo: Por pra-arbaro en okcidenta Eŭropo de Francis Hallé, tradukita de la klubo de Lannion. Parto unu aperis en VT51 p.16 & 17*

#### Eŭropaj arbaroj

Meze de la 19a jarcento, la plejmultaj malnovaj arbaroj de niaj eŭropaj ebenaĵoj malaperis kaj hodiaŭ, komence de la 21a jarcento, la nura kiu pluekzistas estas la pra-arbaro de Bialowieza en Pollando, belega arbaro, kie arboj de escepta amplekso ŝirmas la tutan eŭropan arbaran faŭnon, inkluzive de lupoj, cervoj, linkoj, aproj, alkoj kaj bizonoj. Bedaŭrinde, tiu pra-arbaro estas minacata (pro la aktuala pollanda registaro).

Baldaŭ restos nur en Eŭropo sekundaraj arbaroj, malaltaj, kun difektitaj strukturoj, sen kanopeo kaj kun reduktita biodiverseco. Tio estas maljusta situacio, kompare kun tio, kio okazas aliloke en la mondo.



#### Aliloke en la mondo

Multaj riĉaj kaj industriaj landoj en la mezvarmaj areoj, norde kaj sude, konservis sufiĉe grandajn surfacojn de siaj ebenaj pra-arbaroj : Usono, Kanado, Rusio, Japanio, Ĉilio, Sudafriko, Aŭstralio kaj Novzelando. Por ili, temas pri trezoro, kiun ili protektas zorgeme, favore al turismo, kulturo kaj mitoj, kiuj fondis la nacian historion, sen forgesi esploron pri ekologio, protektadon de biodiverseco kaj kaptadon de atmosfera karbono.

Kial Eŭropo kontentiĝus pri banalaj sekundaraj arbaroj ? Tio kongruas nek kun nia kultura tradicio, nek kun nia postulo je pejzaĝa beleco. Denove, mi ĝin ripetas : estas tro malofte, por ke ekologio kalkulu kun estetiko. Inter ĉiuj arbaroj, la plej bela estas pra-arbaro. Ĝi estas tiu, kiun ni bezonas, kies renaskiĝon ni devas kuraĝigi.

#### La progreso de la arbara industriigo

Niaj ĉiutagaj amaskomunikiloj ofte priskribas la detruon de arbaroj en foraj regionoj de la planedo (brazila Amazonio, Kalifornio, Aŭstralio, ktp...), sed ili estas multe pli diskretaj, eĉ tute mutaj, koncerne la minacoj, kiuj pezas sur la arbaroj de okcidenta Eŭropo.

La nunaj metodoj por arbara ekspluato similas tiujn de industria agrikulturo : uzo de sterkoj sur rapide kreskantaj arboj, kaj pesticidoj malpermesitaj en agrikulturo, sed kies arbaruzo estas permesata : glifozato kaj neonikotinojdoj.

La arboj, ankoraŭ junaj, sed kies trunkoj havas diametron taŭgan por industriaj segejoj, estas hakitaj, per gigantaj maŝinoj. Ĉar la arboj estas ĉiuj samaĝaj, sistema dehakado estas neevitebla, farita de tridek-tunaj maŝinoj, kiuj forigas la stumpojn kaj kompaktigas la grundon, tio kio estos kompensata per sub-plugado kaj novaj kemiaj sterkoj.

El ĉio ĉi, ŝajnas ke ni devas konservi la fortan kaj maltrankviligantan ideon, ke biologia diverseco kaj ligna industrio por la momento estas du neakordigeblaj oponentoj. Kaj en iliaj kolizoj, biodiverseco ĉiam estas la perdanto. La tempo diros, ĉu eblas imagi komunan bazon, sed tio estas temo pri kiu estonteco estas malgaja.

Ĉiukaze, tiu antaŭeniĝo de la arbara industriigo, kaj precipe de la forhakado, kaŭzas fortajn protestojn, kaj mi vidas tion kiel unu el la kialoj de la intereso de la publiko pri nia projekto.

## Sumoo legado.

### Spionoj de Michael Frayn

Literatura genro: historia fikcio

Loganta florodoro kaptas la atenton de oldulo dum somera promenado en angla suburbo. Tiu ĉiodoro tute ne similas la agrablan loniceron<sup>1</sup> aŭ la dolĉan tilion, sed ŝajnas akra kaj kruda, ĝi eĉ fetoras<sup>2</sup> kiam li proksimiĝas de la arbusto. Kio estas tiu terura planto kiu perturbas la maljunulon ? Nur vulgara randa arbusto kun teda aspekto : ligustro<sup>3</sup>, simbolo de deprimaj dimanĉoj dum pluvaj posttagmezoj.

Tamen ĝia floro kapablas krei maltrankvilan ĉeeston. Memoro pri infaneco kutime temas pri « la tuta duonkomprenita promeso de la vivo ». Ĉi tie aperas obsedo pri io, kion li ne ŝatas pripensi, pri io ne solvita, kiu turmentas lin. Urĝas sekvi la spurojn de la arbusto kiu detruas sian pacon.


Post duonjarcento, liaj piedoj portas lin rekte al la sama Sakstrateto, kie situas la samaj dek kvar domoj ĉirkaŭitaj de la samaj ĝardenoj, reĝlando de la infanoj. Mankas io : la sono de nevidataj trajnoj malantaŭ la taluso.

La oldulo observas la vivon de tiu tempa knabo : Stephen Wheatley, fakte li mem. Dum militaj jaroj. Stephen kaj Keith, lia amiko, eksperimentis grandan nombron de projektoj. Ĉiam impona Keith rolis kiel la gvidanto al kiu obeis Stephen.

Komenciĝis la rakonto kiam Keith « eldiris tiujn kvin simplajn vortojn kiuj renversis nian mondon ». Ekde tiam, ĉio estis la sama, tamen ĉio ŝanĝiĝis, La junuloj rolis kiel spionoj observante tage kaj nokte la irojn kaj reirojn de la plenkreskuloj.

*Kial mi ŝatis la libron ?*

Ekde la unuafrazo, la leganto estas kaptita per fetoraodoro ! Surprizo ! La dua kerna elemento estas la sono de trajno, kiu ludas ĉefan rolon en la progreso de la rakonto. La oldulo konservis tiujn sensajn impresojn en la fono de sia memoro.



Spionoj

<sup>1</sup> chèvrefeuille

<sup>2</sup> Puer Fetora = fétide

<sup>3</sup> Troëne



Mi ŝatis la kleran turnon de situacio : en unufrazo la oldulo transformiĝas en la knabon, kiu li estis antaŭ 50 jaroj, kaj ekde tiu momento observas lin.

La verkado efikas : antaŭ la « kvinvortoj », la amikoj ludas kiel ĉiuj adoleskantoj. Post la kvinvortoj, ili transformiĝas en spionojn kiuj profesie observas familion kaj amikojn kiel fremduloj.

Per lerta maniero, la stilo adaptiĝas al la situacio: longaj atendoj de adoleskantoj, rapidaj agoj de plenkreskuloj kaj sono de trajno ritmante la ĉapitrojn.

*Legu kaj ĝuu ! Ŝanjo*

## Vojaĝo

### 97a SAT-Kongreso en Oporto

Komence de aŭgusto 2024, inter la 5a kaj la 11a, okazis en Oporto la 97a SAT-kongreso. Dum la semajno, diversaj ekskursoj estis organizitaj. Mi ŝatus verki kelkajn vortojn pri unu vizito kies temo kortuŝis min.

La 9an de aŭgusto, ĉirkaŭ 50 kongresanoj iris busen de Oporto al la urbo Ilhavo. Tiu ĉi urbo situas 90 km sude de Oporto, en la distrikto de Aveiro, en la centra regiono de Portugalio. La OKK-anoj proponis al ni viziti la marmuzeon de Ilhavo.

Tiu muzeo estis tre interesa kaj "vivanta" loko. Fakte oni prezentas, laŭ realaj proporcioj, kelkajn ekzemplerojn de boatoj uzitaj por la kaptado de la moruoj. Aldone al la boatoj, la vivkondiĉojn ankaŭ prezentis la ĉiĉerono. Tiuj viroj iris for dum longaj monatoj. Ili havis sufiĉe pezan vivon. Kompreneble, sur la ĉefa boato, la reguloj estis tre striktaj, kaj tre "gravis" la hierarkio.



Eĉ tre junaj maristoj estis dungitaj surŝipe. Ili ĉefe prizorgis la saladon de la moruo.

Dum la kaptada periodo, pasis longaj semajnoj kaj la maristoj foje perdis siajn referenc-punktojn: la ideo de la tago, de la dato, pli malpli malaperis. Por helpi ilin kaj ĝojigi la laboron, la kuiristo preparis specialan jaŭdan kukon kaj dimanĉan manĝaĵon. Almenaŭ, la maristoj tiel povis diveni kia tago estas!

La plej danĝeran parton de la laboro travivis la maristoj kiam ili uzis la etajn boatojn. Ili enboatiĝis sur etaj fragilaj

barkoj por kapti la moruojn. Kompreneble, ju pli multe ili fiŝkaptis, des pli altan salajron ili ricevis. De ilia fiŝkaptado dependis la vivkondiĉoj de la familio. Foje, ili ne hezitis fronti danĝerajn situaciojn... La portugaloj fiŝkaptis solaj surbarke, dum la alilandaj kolegoj estis ĝenerale duope.

Pro tiu peza vivo, por elteni kaj antaŭeniri, homoj foje drinkis... povis sin perdi. Kelkaj aliaj, pro laborego kaj ŝanco, riĉiĝis.

Unu el miaj onkloj, kiu naskiĝis en 1925, estis fiŝkaptisto de moruo. Li nek riĉiĝis, nek bonŝancis...

Mi tre dankas la OKK-anojn pro tiu ĉi vizito. Mi ankaŭ dankas la eksan mariston kiu rakontis sian sperton kaj kantis por ni.

Venontjare, la SAT-kongreso okazos en Svitavy, Ĉeĥio, inter la 12a kaj 19a de julio.

Claudine Guéguen

## La 109-a Universala Kongreso de Esperanto Aruŝo / TANZANIO 2024

Kvaropo el Bretonio partoprenis la lastan UK-on en Tanzanio, unuafoja monda kongreso sur la afrika kontinento : kun la paro Le Strat, Françoise kaj Hervé, mi Elinjo kaj mia edzo Petro malkovris tie alian mondon, tute nekutiman al okcidentanoj !

Tanzanio situas en orienta Afriko, ĉe la hinda oceano, sude de la ekvatoro (do konsci, ke la kongreso okazis en vintro). Ĝi landlimas norde kun Kenjo kaj Ugando, okcidente kun Ruando, Burundo kaj Kongo Kinŝasa, sude kun Malavio, Mozambiko kaj Zambio. Ĝia teritorio okupas 900 000 km<sup>2</sup> (Francio 550 000). La loĝantaro nombris en 2022 ĉirkaŭ 61 milionoj. La lando konsistas el kontinenta parto, *Tanganjiko* kaj apuda insularo *Zanzibaro*. Ĝis 1961 ambaŭ estis Britaj kolonioj. En 1961 sendependiĝis Tanganjiko, en 1963 Zanzibaro. Ili unuiĝis je unu ŝtato en 1964. La nomo *Tanzanio* devenas de la komencaj silaboj de *Tanganjiko* kaj *Zanzibaro*. La ĉefurbo estas Dodoma. La klimato estas tropika. La urbo Aruŝo situas 1400 metrojn alte, la vintra vetero estis agrabla, inter 15 gradoj matene ĝis 28 vespere. La plej alta monto de Afriko, la fama *Kilimanĝaro*, staras 70 kilometrojn nordoriente. Malgraŭ siaj



4800 metroj de alteco, pro la klimatsanĝiĝo ĝi verŝajne perdos siajn lastajn supraĵajn « eternajn » neĝojn post kelkaj jardekoj.

Iom pri la loka ĉiutaga vivo : la koloniistaj Britoj postlasis spurojn, kiel sian lingvon (oficiale agnoskata kune kun la svahila), stiradon maldekstre de la vojo kaj lernejkostumojn por la infanoj. Nur la ĉefaj vojoj estas gudrataj, la ceteraj konsistas el tervojoj sulkaj kaj polvaj.



chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :  
tado Josette Ducloyer [jpducloy@gmail.com](mailto:jpducloy@gmail.com)  
tenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

Laŭlonge de la vojoj staras ĥaose sinsekvaj malriĉaj buntaj budoj proponantaj plej diversajn varojn kiel fruktojn, kuiritajn bananojn, rostitajn maiz-spikojn, trinkaĵojn, ŝtofojn, domobjektojn, meblojn, artaĵojn ..., tio en zumado de motorcikloj veturantaj ĉiudirekten, plenplenaj ŝarĝaŭtoj, taksietoj kaj multaj safariveturiloj. Dufoje tage ni preterpasis grupojn de ĉiaaĝaj gelernantoj, kiuj rapidis al la instruejo en sia samkolora lernkostumo.

Tanzanio atente zorgas pri edukado de siaj infanoj. Eĉ se multaj el ili paŝu ĉiutage plurajn kilometrojn de la hejmo al la lernejo iren kaj same reen, ĉiu ricevas instruadon, ĉu de ŝtataj ĉu de privataj edukejoj. Longa paŝado tra kampoj kaj laŭ polvaj kaj ŝtonetaj tervojtoj kontraŭ lernado, jen pensiga defio, pri kiu ni okcidentanoj ne kutimas konscii !

Pri religio, sur la kontinento kristanoj kaj islamanoj samnombras, sed sur la insularo Zanzibaro 90 % de la loĝantaro estas islamaj. Politike, Tanzanio estas federala respubliko, kie la prezidanto, nuntempe *Samia Suluhu*, islama virino, estas samtempe la ŝtatestro kaj registarestro. La reĝimo estas parlamenta.

### Antaŭkongresa safari-ekskurso 30 Julio - 2 Aŭgusto 2024

Petro kaj mi partoprenis en kvartaga emociplena safario. Ni veturis sepope en speciala aŭto, kies tegmento leviĝis dekkvin centimetrojn supren, gviditaj tra tri naciaj parkoj de klera ŝoforo, kiu ne nur kompetente stiris sur la malfacilaj difektataj tervojtoj sed ankaŭ komentis kaj klarigis ĉion ĉirkaŭ ni. La safariaŭtoj, apartenas al ĉiaj kompanioj (ĉefe ĉinaj kaj sudafrikaj) sed nur al unu sama marko, Toyota, konata pro sia granda fortikeco !

En la vizititaj parkoj, la lago Manyara, la kratero Ngorongoro kaj la t.n. Tarangire, ni vidis de proksime multajn el la sovaĝaj bestoj de niaj infanaĝaj bildlibroj : pavianojn petole kurantajn ĉirkaŭ la veturiloj, grim pantajn aŭ serĉantajn parazitojn unu al la alia, familiojn de elefantoj kun ĝiaj idoj, ĝirafojn, impalantilopojn, leonojn gvate kaŭrantajn sub la arboj, du virajn strutojn en timiga danco cele al forpeli la rivalon, zebrojn skrapantaj al si la haŭton ĉe rokoj pro parazitjuko, grandajn hienojn, gruntantajn fakoĉerojn, vicajn de ĝibaj gnuoj, arojn de grandkornaj bubaloj, hipopotamojn pigre kuŝantajn sur la lagbordo, diversajn birdojn kiel ardeojn, pelikanojn, grizkronajn gruedojn, rozkolorajn flamengojn ... kaj eĉ, volvitajn ĉirkaŭ alta arbobranĉo, longan pitonon ! Krom la bestoj, estis ankaŭ multnombraj baobaboj, tiuj imponaj arboj kun dika trunko kaj multaj branĉoj disiĝantaj al la ĉielo. Ĉe ili pendis nestoj de birdoj, kies nomo elvokas la metion de



teksisto kaj sidis pavianoj senŝeligantaj fruktojn de la arbo por eltiri kaj manĝi ties kernon. Aliaj interesaĵoj estis multnombraj altaj plurturaj termitejoj. Vere kia bonŝanco malkovri propraokule tiujn admirindajn pejzaĝojn kaj sovaĝajn bestojn en ties naturaj medioj !

Ni spertis ankaŭ renkontiĝon kun lokaj triboj. Iu ĉefe impresis nin, la Hadzoj. Apenaŭ tuŝantaj la civilizacion, tiuj homoj vivas en-kaj-de la naturo, kvazaŭ prahistorie ! Sen elektro, do sen la multnombraj aparatoj, kiuj ŝajnas al ni ne malhaveblaj, ili dormas surgrunde, preskaŭ sen ajna ŝirmilo, gardataj de hundoj. La akvo, malofte, servas nur al trinkado kaj kuirado. Ili ne lavas sin (!). La viroj ĉasas, la virinoj zorgas pri la infanoj kaj la manĝoj. Ili

migras ĉiun sesan monaton por pasigi la malbonan sezonon en grotoj. El nia vidpunkto, ni penas kompreni tiun malkomfortan vivmanieron, tamen mi atestas, ke ili montriĝis afablaj homoj ridetantaj kaj tutcerte feliĉaj ! Vizitoj al aliaj triboj, paŝtistoj Dagotaj kaj Masajaj malpli plaĉis al ni pro ia impresio de turisma kaptilo.

Ni malkovris ankaŭ aliajn homojn ĉe la belega lago Eyasi. Tie en fortega vento kaj tre malfacilaj kondiĉoj laboris fiŝkaptistoj. Surgrunde sekiĝis grandaj amasoj da fiŝetoj. La ordoraĉo dismetita de la vento streĉis ĉies spiradon. Viroj, klinataj sur siaj remiloj, penis direkti siajn pezajn barkojn, dum aliaj zorge okupiĝis pri siaj retoj, la tuto en belegaj nuancoj de blanko, flavo, bruno, oranĝkoloro : admirinde!

Entute ni travivis tre interesan ekskurson, kaj rilate al la naturo kaj la sovaĝaj bestoj, kaj rilate al homoj tute proksimaj al tiu naturo.

### La Kongreso : 3 - 10 Aŭgusto 2024

La 854 kongresanoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), venintaj el 65 landoj al Aruŝo traktis la temon *Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo*. Tiu sukcesa kongreso montris la vigecon de la esperanta movado en Afriko. Atestas pri tio la aktiva partopreno de multaj afrikaj junuloj, ĉefe el Tanzanio (144), Burundo (70) kaj Kongolando (60).

Kiel kutime la programo estis riĉa. Okazis diversaj kursoj, kunvenoj, renkontiĝoj, prelegoj, spektakloj, koncertoj kaj festoj. Petro kaj mi aparte kaptis la okazon, unuafoje ĉeestante nigrulan Afrikon, partopreni en multaj kulturaj ekskursoj : termofontoj, kafplantejo, bananplantejo, rigardo al Kilimanĝaro (ne grimrado !), muzeo de Tanzanitoj (loka duonprecioza blua ŝtoneto), centra bazaro, masaja bazaro ... Vespere, ni malkovris lokajn dancojn kaj aparte ĝuis belegan kantadon de la plej fama kanzono de orienta Afriko, *Malaika* (« anĝelo » en la svahila).

### Postkongresa restado en Zanzibaro 10 - 16 Aŭgusto 2024

Ni pasigis tre agrablajn tagojn tie, kun pli altaj temperaturoj, eĉ ĉirkaŭ 30 gradoj en la maro ! Ni ĝuis interesajn vizitojn al marĉoj, mangrovo, spicejo, sklav-koncentrejo, delfenoj ĉe laguno ...

Ni navigis al la korala barilo sur tradicia loka velŝipo, konsistanta el malplenigita arbotrunko kun du flankaj lignopecoj por la ekvilibro kaj granda triangula velo. Ni plonĝis kaj naĝis kun masko kaj palmoj inter la fiŝetoj, kiuj venis engluti panpecojn rekte en niaj manoj. Ni kredintus nin en tropika akvario !

La ĉefurbo kaj ekonomika centro nomiĝas *Ŝtonurbo* (angle *StoneTown*). Monda heredaĵo de Unesko ĝi estas unu el la plej gravaj urboj de la svahila kulturo. Ĝi famas pro siaj belaj skulptitaj pordoj kaj la stratlabirinto de sia historia urbocentro. Tie naskiĝis la mondkonata *Freddie Mercury*, kantisto de la muzikgrupo *Queen*.

Ni rehejmeniris post tri semajnoj kun, en la kapo kaj fotilo, belaj memoraĵoj pri tiu admirinda lando kaj ties akceptema popolo, konsciaj pri la relativeco de niaj oftaj motivoj de okcidenta grumblado !

Kiel diras la Tanzanianoj,

Ĝambo, Akuna Matata !

Saluton, ĉio glatas !

Elizabeth Le Dru / Elinjo

# Ĉîceronado en la haveno Le Lugué

En Junio 2024, Armor Esperanto proponis ĉetablabiladon en la parko Rohannec kaj ĉîceronadon en la haveno Le Lugué, inter Plérin kaj Saint-Brieuc.



## 1- La buntaj fasadoj

Belaj kolorigitaj fasadoj rande staras ĉirkaŭ la ĉefa placo de la haveno. Alpremiĝitaj kontraŭ la klifoj, tiuj malnovaj domoj de ŝipproprietuloj transformiĝis en restoraciojn, trinkejojn, luksan nutraĵvendejon, alkoholaĵvendejon, diskovendejon ktp. Vigla kaj tipa kvartalo kiu invitas vin gapi, vagadi kaj distriĝi !

## 2- La staploj de la haveno

Vi estas fronte al unu el la plej malnovaj domoj de la haveno, hodiaŭ transformita en atelieron de terpotisto. Vere historia loko ! Antaŭ la konstruado de la kajoj, la ŝipoj alteriĝis fronte al tiuj deponejoj. Tie oni stokis terpomojn, cerealojn kaj teksaĵojn de Uzel kaj Quintin, famaj urboj pro iliaj toloj el lino. Tuj apude, staplo je salo utilis interalie al la konservado de la moruoj fiŝkaptitaj en foraj maroj.

## 3- Domo de la ŝipestro

Tiu ĉi domo, kies posedantoj estis ŝipestroj, datiĝas de la 18a jarcento. Antaŭe ĝi nomiĝis « hotelo de Kerautem », kiu estis la nomo de ĝia unua posedanto, iama urbestro de Plérin. La doganistoj uzis la teretaĝon de tiu domo por stoki varojn atendente la pagon de impostoj.

Hodiaŭ sidas ĉi-tie la asocio kiu administras « le Grand Léjon », tradician velŝipon kies hejmhaveno estas Le Legue.

#### 4- Domo de kariteco

Je la fono de pavimita korto, en ĝemelaj domoj troviĝis lernejo de kariteco. Komunumo de monaĥinoj « sœurs blanches » estris la lernejon kies nomo ŝanĝiĝis al « Congrégation des filles du Saint-Esprit » je la 18a jarcento. Marie Balavenne, konata en St-Brieuc, partoprenis la fondadon de tiu lernejo.

#### 5- Elŝtona ponto

Unue konstruita el ligno, tiu ponto inter Saint-Brieuc kaj Plérin malaperis pro grandega altiĝo de la rivero Gouët. Ĝin oni rekonstruis el ŝtonoj antaŭ kvarono da jarmilo. Nun la ponto limas la alvalan trankvilan havenon Légrué kaj la almontan porkajakan sovaĝan riveron. Ĉe la ponto staras mejloŝtono, kiu markas la komencon de la « Chemin Sauvage ». Tiu ĉi 4600 kilometrojn longa pado permesas al ekskursantoj piediri de Saint-Brieuc al Charleville-Mézières (08) tra senurbaj pezjaĝoj. Ekzemple ĝi trairas la neebenan altebenaĵon « Plateau de Millevaches » (19) kaj la ursoplanan departementon Ariège (09). Bonan plezuron!

#### 6- La Kvadrato de Rosengart

Vi estas en la renovigita parto de tio kio estis la plej vasta industria spaco de San Briego en la 20a jarcento : la uzinoj de aŭtoj Rosengart (kie ankaŭ la eksterŝela boatmotoro estis inventita !) kaj la firmao Chaffoteaux & Maury. La emajladejo, la boltfabriko, la kaldrofabriko kiuj famigis la ĉemurajn akvovarmigilojn tra Francio, estas nun anstataŭgataj de divideblaj oficejoj , ĉambroj por prelegoj kaj ekspozicioj, restoracio, vendejoj, lignolaborejo ktp.



#### 7- Parko de Rohannec'h

Vilao Rohannec'h kun sia strategia rigardejo al la haveno estis konstruita laŭ itala stilo je la komenco de la 20a jarcento. Vicgrafo Alain Le Gualès de Mezaubran, riĉa komercisto, konstruis ĝin por elrigardi alvenon de siaj ŝipoj.

Ekde 1946, tiu vilao apartenas al departemento Côtes d'Armor kaj nuntempe utilas por portempe tie loĝantaj artistoj.

Agrabla pado sub arboj kunligas la vilaon al haveno per kruta deklivo.

## 8- Turniĝanta ponto

Tiu ponto kiu turniĝas estis konstruita je la fino de la 19a jarcento por komercistoj. Per tiu ponto, ili ne bezonis iri laŭlonge de ĉiuj kajoj por retrovi la alian flankon de la baseno.

La stacidomo troviĝis je la dekstra bordo, la ponto pli rapide konektis la du flankojn.

Hodiaŭ, proksime de la ponto, videblas montoj da sablo, da konkajoj, da konstrulignoj...

Troviĝas tie ankaŭ zono por ripari la ŝipojn, aŭ farbi ilin. Ŝipoj kies pezo atingas 350 tunoj povas eniri tiun taŭgan riparlokon.



*Tradukis kaj verkis Amapola, Laurent, Jean-Yves, Murielle kaj Jérôme, kaj fotoj de Dimytri.*

## Farendaĵoj notindaj en via kalendaro



Esperanta studperiodo  
Saint Briec  
De la 16<sup>a</sup> ĝis la 17<sup>a</sup> de novembro 2024

Detaloj en tiu VT



## Bonvenon en la kulturdomo Kastelo Greziljono

AG Armor Esperanto  
Sabato 25a de januaro

## Rencontres Espéranto Plouézec

23-24 Aŭt 2025

## De la 21a ĝis la 30a de oktobro

13-a komuna feriado por infanoj, familioj,  
geavoj

KURSOJ kaj variaj aktivaĵoj, programo por  
infanoj.

HORA (KORUSA) KANTADO

EKZAMENSESIO de Franca Esperanto-  
Instituto.

Detaloj en tiu VT.

## PRINTEMPaS : intensivaj kursoj

## De la 18a ĝis la 27a de aprilo

Kurso kun Zsófia, Marion, Konstantin aŭ Paweł  
(2025-apr-18/27)  
por prepari internacian Esperanto-ekzamenon



## 21-a Novjara Renkontiĝo 2024/2025

De la 27<sup>a</sup> de decembro 2024 ĝis la 3<sup>a</sup> de  
januaro 2025

Internacia unusemajna  
renkontiĝo por plenkreskuloj,  
junuloj kaj infanoj, kun  
multfaceta programo

Informoj :

<http://esperanto.land/nr/>

## Informoj en

<https://gresillon.org>